# TELOPEO

Oficiala Organo de La Esperanto-Federacio de Nova Sud-Kimrujo

*Volumo 53, Numero 01-02, Januaro-Februaro 2019*

**Esperanto Domo, 143 Lawson St, Redfern, Sydney NSW 2016, Aŭstralio**
**Redaktoro: Dmitry Lushnikov, Provleganto: Nicole Else**


## La kaskedoj alvenis!

*Nicole Else, Sekretario*

La estraro de la Novsudkimruja Esperanto-federacio ĵus decidis donaci belan Esperanto-kaskedon al ĉiuj membroj. Se vi forgesis renovigi vian membrecon, kompreneble ne estas tro malfrue por tion fari.
Iru al http://esperantohouse.org.au/eo/.
Sube de tiu paĝo vi trovos verdan butonon "Membriĝi nun (aŭ remembriĝi)." Mi esperas, ke vi daŭre pretas subteni la Esperanto-movadon en NSK.
Kion vi ŝatus, ke la Federacio faru por helpi la Esperantistojn kaj disvastigi Esperanton? Bonvolu sendi viajn sugestojn. Esperante revidi vin baldaŭ mi amike salutas vin,
Nicole




## Internacia Tago de Patrinlingvo: Esperanto en Ŝtatbibloteko de Novsudkrimrujo

*Rainer Kurz*



La unua Internacia Tago de la Gepatra Lingvo estis proklamita je la 21-a de februaro 1999 je propono de Unesko al la Unuiĝintaj Nacioj. Unesko prunteprenis ĝin de Bangladeŝo kie en 1952 sep junuloj mortis batalante kontraŭ la instancoj por sia gepatra lingvo, la bengala.

En Sidnejo, sinjoro Nirmal Paul el Bangladeŝo estas forta motoro por la Internacia Tago de Patrinlingvo. Jam dum kvar jaroj ni Esperantistoj kunlaboras por prezenti Esperanton dum la ĉiujara ceremonio.

Ĉi jare, la ceremonio okazis en granda solono de "State Library of NSW". Partoprenis ĉirkaŭ 50 reprezantoj el la diversaj gepatraj lingvoj. Dum la prelegoj evidentiĝis ke kelkaj lingvoj estas tre endanĝeritaj, ekzemple la ujgura lingvo.

Post la Bengala lingvo, Esperanto estis la dua plej bone reprezentita lingvo. Entute 6 Esperantistoj partoprenis: Nicole Else, Dmitry Lushnikov, Greg Cooper, Doris Chen, Adam Levy kaj mi.

Kiel speciala honoro, mi ne nur havis la ŝancon prezenti Esperanton. Esperanto estis ankaŭ la lasta de la prezentitaj lingvoj – eble ĉar Esperanto estas tre speciala "gepatra lingvo". Interese estas, ke Esperanto estas la sola reprezentita lingvo kiu ankoraŭ kreskas.

Poste estis oficiala akceptado en alia salono de la Ŝtatbiblioteko de Novsudkimrujo. Tie okazis viglaj diskutoj inter la partoprenantoj. Du personoj alparolis min dezirante plian informon pri Esperanto.

## Plurtaga laborkunveno por la Arĥivo

*Jonathan Cooper, Prezidanto*

Karaj amikoj,

La Esperanto-Federacio de Nova Sud-Kimrio kaj la Aŭstralia Esperanto-Asocio okazigos plurtagan laborkunvenon (multi-day working bee) por aranĝi la Aŭstralian Esperanto-Arkivon en Esperanto-Domo. Ĝi okazos inter la 24-a kaj la 26-a de aprilo (merkredo ĝis vendredo). La kunveno oficiale komenciĝos je la 10-a ĉiun matenon.

Ni planas okazigi almenaŭ unu duontagan ekskurson, verŝajne dum la posttagmezo de la unua tago (merkredo). Jonathan Cooper estus feliĉa enkonduki vin al sia eks-laborejo, la bela Art- Galerio de Nova Sud-Kimrio, kaj ankaŭ la proksima Reĝaj Botanikaj Ĝardenoj.

Ekzistas iom da loĝado ĉe Esperanto-Domo por tiuj, kiuj ne loĝas en aŭ proksime al Sidnejo:
• la gastĉambro – kun unu duobla lito, unu unuopa (etaĝ-)lito kaj unu elfaldebla sof-lito
• la supra etaĝo de la ĉefa konstruaĵo – kun du pneŭmataj unuopaj litoj sur la planko

Bonvolu informi nin (nsw@esperanto.org.au) pri via bezono (aŭ deziro) kiel eble plej frue, kaj ni penos plej bone.
Ĉu vi havas historiaĵojn rilate al la Esperanto-movado en Aŭstralio, kiujn vi volus donaci al la Arkivo? Se jes, bonvolu alporti ilin kun vi, se eblas.

[Por tiuj, kiuj interesiĝas, la tagon post la laborkunveno, sabaton, la 27-an de aprilo, okazos senpaga lingvo-festivalo ĉe la publika biblioteko Gordon (inter tagmezo kaj la 4-a ptm).]

Amike,
Jonathan

## Pica vespero ĉe Esperanto Domo



La sekva pica vespero okazos sabaton la 16-an de marto je la 6a ptm ĉe Esperanto Domo (143 Lawson Street, Redfern)

## Lingvaj Festivaloj

Ku-ring-gay lingva festivalo okazos en la biblioteko de Gordon sabate la 27-an de aprilo.
Ni planas organizi la duan Centran Marbordan lingvan festivalon en Erina biblioteko la 15-an de junio.
La ĉefa evento, la Sidneja lingva festivalo, okazos en la Ŝtata Biblioteko de NSK sabate la 21-an de Septembro.
Pli da informoj: www.LanguageFestival.org



EFNSW: Esperanto Domo, Unua Dimanĉo de la monato 11:00 ĝis 13:00
Por ĉiuj senpaga manĝeto, Esperanto Domo , Unua Dimanĉo de la monato 13:00 ĝis 15:00
Kontaktu Jonathan Cooper 0403 358 941

Manlia Esperanta Klubo ĉe Bavarian Beer Cafe, Manlia Kajo
1a kaj 3a Sabatoj; 10:00 atm; Komencantoj Bonvenaj
Kontaktu Roger (02) 9976 6320 *manly@esperanto.org.au*

La Meza Marborda Grupo; 3a Dimanĉo de la monato; kontaktu Joanne (02) 4362 8287
Novkastelanoj: Kontaktu Andrew (02) 4951 2084 *newcastle@esperanto.org.au*

La Suda Marborda Grupo; malgranda grupo kunvenas foje je Bega.
Komencantoj Bonvenaj. Penny Vos (02) 6495 2922

Esperanto-Kafo-Klubo de Kanbero Jaŭde 17:00 la Capital Pancakes, 122 Alinga St.,Civic. Huigh 02 6288 4334 *huighm@gmail.com*


La Esperanto Federacio de Nova Sud-Kimrujo: Esperanto Domo,
143 Lawson St, Redfern 2016 (02) 9319 4775;
Malfermata ĉiun merkredon, 15:00 – 17:00
*(Sonigu elektran zumilon ĉe la strato)*
www.EsperantoHouse.org.au
retadreso: nsw@esperanto.org.au




| | |
|---|---|
| Prezidanto: | Jonathan Cooper |
| Vic-prezidanto: | Andrew Spannenberg |
| Sekretario: | Nicole Else |
| Kasisto: | Dmitry Lushnikov |
| Estrarano: | Alan Turvey |

# amikumu

Amikumu estas apo (poŝtelefona aplikaĵo), kiu helpos vin trovi kaj kontakti proksimajn esperantistojn – ĉiam, ĉie!




Esploru profilojn kaj esprimu vin

Trovu esperantistojn apud vi ĉiam, ĉie

Konatiĝu kaj renkontiĝu!

Elŝutu Amikumu
iPhone 4S aŭ iPad 2+:
Android (OS 4.0.3+):

La utileco de tia aplikaĵo por esperantistoj estas klara, iusence ĝi estas ĝisdatigo de la plej malnova servo de UEA, la Delegita Reto, kiu same celis plifaciligi kontaktojn inter homoj dum vojaĝoj aŭ pri komunaj interesoj.

– Mark Fettes, la Prezidanto de UEA

En Londono, mi trovis esperantiston apude per Amikumu kaj ni renkontiĝis tutsimple tiel.
Mi apenaŭ povas atendi por uzi ĝin denove!

– Orlando Raola, Prezidanto de Esperanto-USA

## Por disvastigi Amikumu

Plusendu ĉi tiun flugfolion al ĉiuj konatoj per retpoŝto, fejsbuko kaj tvitero.

Plusendu ĉi tiun flugfolion al la organoj de via loka movado.

Printu ĉi tiun flugfolion kaj diskonigu ĝin ĉe via loka klubo.

Se vi volas kontakti la teamon de Amikumu pri gazetaj anoncoj aŭ demandoj, bonvolu retpoŝti nin ĉe

info@amikumu.com

amikumu.com

www.facebook.com/amikumuapp

La Oficiala Sponsoro de Amikumu estas la Universala Esperanto-Asocio